

- J. Heinz k.a. (red.), Cognitive electrophysiology (pp. 183-210).  
La Jolla: Birkhäuser Boston.
- Luck S. J., Vogel E. K. & Shapiro K. L. (1996). Word meanings can be accessed but not reported during the attentional blink. *Nature*, **383**, 616-618.
- Nobre A. & McCarthy G. (1995). Language-related field potentials in the anterior-medial temporal lobe: II. Effects of word type and semantic priming. *Journal of Neuroscience*, **15**, 1090-1098.
- Perani D. k.a. (1996). Brain processing of native and foreign languages. *NeuroReport*, **7**, 2439-2444.
- Perani D. k.a. (1998). The bilingual brain: Proficiency and age of acquisition of the second language. *Brain*, **121**, 1841-1852.
- Rodriguez-Fornells A., k.a. (2002). Brain potential and functional MRI evidence for how to handle two languages with one brain. *Nature*, **415**, 1026-1029.
- Rugg M.D. (1990). Event-related brain potentials dissociate repetition effects of high- and low-frequency words. *Memory and Cognition*, **18**, 367-379.
- Sachs R. (2004). Ĉu dependas de la "bela vortsono"? *Sci. Rev.* **55**, 101-102
- Steinberg D.D., Nagata H. & Aline D. (2001). *Psycholinguistics: Language, mind and world*. 2-a eld. Essex: Pearson Education.
- Thompson-Schill S.L., D'Esposito M. & Kan I.P. (1999). Effects of repetition and competition on activity in the left prefrontal cortex during word generation. *Neuron*, **23**, 513-522.

#### Adreso de la aŭtoro

Prof. NAGATA Hiroshi  
Faculty of Economics  
Okayama University  
Tsushima, Okayama 700-8530  
JAPANIO

<hinagata@e.okayama-u.ac.jp>

#### Priaŭtoraj informoj

La aŭtoro laboras pri psifolingvistiko, precipe pri akirado de denaskaj lingvoj, homa prilaborado de frazoj, kaj aktuala (kontraŭe al ideale-formaligita) stato de lingvoscio atingita fare de plenkreskuloj. Liaj esploroj estas publikigitaj en diversaj fakrevuoj, inkluzive de Scienca Revuo.

## Pseudoteorio pri (ne)analizebleco de vortoj en Esperanto

KAVKA Josef

La Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (NPIV, 2002), kontraste al la tradiciaj konceptoj, lanĉis strangan teorion, ke iuj sciencaj vortoj estas neanalizeblaj, aliaj jes analizeblaj; tiujn ĉi oni povas "dishaki", t.s. dividi al vortoj memstare ekzistantaj.

Por demonstri la du apartajn kategoriojn, mi restu plej prefere en mia profesia fako.

1. "Neanalizebla" estas ĉiu vorto, kiu enhavas la grekdevenan leksemon *ge/* kun la signifo **tero**. NPIV registras entute pli ol 30 tiajn vortojn ekde **geocentra** tra **geologio** ĝis **geotrupo**. Ĉar sendube oni jes povas analizi ilin (kp. la 4 NPIVajn signifojn de la oficiala verbo **analizi**), pli precize estus diri "nedishakebla" anstataŭ "neanalizebla".

2. Male, "analizebla" laŭ NPIV estas ekz. la neoficiala **petrologio**, sed ne la fundamenta **petrolo**, kvankam en ambaŭ troviĝas la leksemo *petr/*, kiu estas la radiko de la greka *petra* = roko, Do, kiel "analizas" (pli precize dirite "dishakas") NPIV la neoficialan vorton? Jene: *petr/* kaj */ologio*. Nu, tiu */o/* ne estas parto de la sekva leksemo, sed nur junga morfemo, kiu aliokaze povas manki, ekz. en *petr/olo*, latine *petr/oleum*. Alia okazo ofertas jungan */i/*, ekz. en la latina verbo *petr/i/ficare*, kies supino *petrefactum* havas la jungan */e/*.

Da sciencaj terminoj kun *petr/* ekzistas multo en diversaj fakoj. En la petrologio de metamorfaj rokaĵoj oni renkontiĝas kun **petroblasto**; tiu blasto jes kapablas ekzisti memstare, same kiel fiziko en petrofiziko, sed el tio tute ne rezultas, ke eblus memstarigi la vorton "petro", kiu ekzistas en neniu scienca libro pri petrologio. Memstarigis ĝin R. Gérard, la aŭtoro de la Esperanto-traduko en A. Cailleux (1965). Sed Gérard ne estis profesia petrologo, eĉ ne povis bazi sian "inventon" sur iu franclingva teksto, kie troviĝas sole la termino *roche*. En la ĵus referencita verko, la ĉapitro pri rokaĵoj titoliĝas germane *Gesteine*, hispane *rocas*, esperante "petroj", ruse *gornie porodi*,

